95
(113)
SEPTEMBRO / OKTOBRO 1991 ISSN 0150-5823

**DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMILO**
Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE
Unu n-ro : 10 FF. Unujara abono : 60 FF ĝirotaj al
**CERCLE AMICAL ESPERANTISTE pĉk 3371 74 M Bordeaux**
(mencii same sur bankĉekoj!) Nia tel.: 53 95 40 26

# ESPERANTO : ĈU KOMUNIKILO POR MONDA KOMUNUMO, AŬ LINGVO POR ĜUO KAJ EVOLUO DE LA INDIVIDUOJ?

*Ĉiu homo estas unikaĵo, kies percepto de komprenaĵoj estas solsola. Konkreta realaĵo vekas ĉe ĉiu homo malsaman bildon. Pro sia artefariteco, Esperanto ne eskapas tiun leĝon. Kompare al la naciaj lingvoj, tio estas malavantaĝo. Nome, la uzanto de denaska lingvo ne pasigas la tempon, serĉante celon por sia esprimrimedo. Ĝi estas parto de lia memo kaj partoprenas en ĉiuj okazaĵoj de lia vivo. Male, la amata ĉevaleto de multnombraj esperantistoj estas la diskutado pri la lingvo, ĝia celo, ĝia evoluo ktp., la temoj abundas. En la nuna disvolviĝstato de Esperanto, multnombras tiuj, kiuj serĉas rekuraĝigan horizonton por nia afero.*

*Lingvo estas komunikilo (eĉ evidentaĵoj bezonas esti ripetataj). Sen ia dubo, ankaŭ Esperanto estas tia. Sed ĝi posedas unikan econ : esti internacia. Ĝia ombro kovras ĉiujn partojn de la mondo. Ĝi ignoras la landlimojn. Tio estas ĝia esenco kaj pravigas ĝian ekziston.*

*Zamenhof diris en "**Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia**" :*
*"La ekzistado de lingvo internacia, per kiu povus kompreniĝadi inter si la homoj de ĉiuj landoj kaj popoloj, alpor-*

tus al la homaro grandegan utilon."

Tia citaĵo malpermesas ian ajn teoriumadon pri la celo de la iniciatinto de Esperanto.

Ĝis nun, nur parte sukcesis la afero, se oni konsideras ke ĝi ne fariĝis amaskomunikilo kaj restas la akiro de kelkcentmiloj da privilegiuloj kiuj, sen ia antaŭjuĝo, unue ekzamenis, poste lernis la lingvon.


Ĉagrenemuloj povus konsideri la nunan atingitan rezulton fiasko. Tion emas fari la malestimantoj de nia lingvo. Malprave! Esperanto ja ekzistas kaj ankoraŭ disvastiĝas, konstruante komunumon kiu havas siajn proprajn kutimojn, sian jarcentaĝan kulturon, siajn renkontiĝejojn, siajn verkistojn, kantistojn ktp., kaj kies devizo estas : amikeco, toleremo kaj helpemo. Nenia alia lingvo povas glorigi sin per tiel bona rezulto. Male, naciaj lingvoj ofte estis-as-os kaŭzo de sangamaj militoj.

Tiom grava rezulto jam povus kontentigi la Esperantaron. Sed, trafante du celojn per unu ŝtono, Esperanto vekas ĉe siaj uzantoj ankaŭ avidon al pli intelekta vivo.

Kaj jen la miraklo : ĉar ĝi estas internacia komunikilo, nia lingvo akcelas harmonian disvolviĝon de la homoj, kiuj uzas ĝin. En ĉia homa aktiveckampo, Esperanto forprenas la naciajn antaŭjuĝojn, plivastigante niajn esplorterenojn. Ĝi aperigas novan homon, kiu ĝuste taksas la aĵojn laŭ iliaj veraj valoroj. Kiom granda estas la ĝuo eliri el la nuna ĉiutaga streĉiga vivo, kies precipa leĝo estas perlabori monon, kaj eniri aliajn regionojn, kie regas amo, spiriteco kaj frateco. Sen ia dubo, Esperanto estas taŭga ilo por atingi altnivelan humanismon.

La vojoj de Esperanto estas multnombraj kaj diversaj : ili tamen ne estas apartigeblaj. Post Zamenhof, Grabowski, Schwartz, Lanti, Waringhien, Auld, Schultz kaj multaj aliaj, ĉiu laŭ sia diferenco, estas brikoj de la Esperantista domo, kiun neniu rajtas fendeti per vanaj, akraj debatoj.

**Henri CASTIAU**



## LA DANĜEROJ AL ESPERANTO

Ĝenerale la Esperantistoj pensas, ke la nuraj danĝeroj al Esperanto estas la subpremo kaj malpermeso ate de diktatoroj kaj la forvelkigo de nia lingvo ate de kompleta ignorado, en ĉiuj landoj. Malmulte oni konscias, ke ekzistas alia danĝero al Esperanto, nome ke ĝi tiom ŝanĝiĝos ke ĝi ne plu havos la utilon, kiun ĝi havis ĉe la naskiĝo kaj dum la junaĝo. Por klarvidi tiun danĝeron, ni momente ekzamenu la diferencojn inter etnaj lingvoj kaj universalaj lingvoj.

La etnaj, t.n. naturaj, lingvoj daŭre ŝanĝiĝas pro malsimplaj influoj. Oni malĝuste nomas la ŝanĝiĝadon de la etnaj lingvoj kreskado. Malĝuste, ĉar kreskado enhavas la sencon de maturiĝado, de pliboniĝado aŭ pligrandiĝado, kaj de transformado tra diversaj interaj statoj al fina stato normala kaj perfekta. Sed tio ne okazas ĉe la etnaj lingvoj (aŭ nur tre malmultgrade, nome kie ĝia vorttrezoro iom, ege malmulte en komparo, pligrandiĝas pro, kaj spite al sufiĉe granda, pligrandiĝo de la homa tekniko). La granda plejmulto de la ŝanĝiĝoj tute ne estas pliboniĝoj, nur aliiĝoj. Eĉ la simpliĝado de kelkaj gramatikaj reguloj, kiu okazas ĉe multaj lingvoj (ekz. la angla), kaŭzas la formiĝadon de aliaj reguloj, ofte pli subtilaj kaj malfacile kompreneblaj, ekzemple koncerne la vortordon, aŭ la interagadon de vortoj, aŭ la kunuzadon de unu vorto kun nur limigita nombro da aliaj vortoj. Krome iuj gramatikaj reguloj povas ekhavi tiom da esceptoj ke la ĉefregulon oni ne plu rimarkas. Same temas pri la signifoj de la individuaj vortoj : iliaj signifoj ne pliboniĝas nek pliklariĝas, sed simple ŝanĝiĝas. Same ne kreskas, sed simple aliiĝas, la formo kaj la prononcado de la vortoj. La kaŭzoj de tiuj ŝanĝiĝoj estas pluraj, sed ofte tute hazardaj. Tamen la rezulto estas ne nur daŭra

ŝanĝiĝado, sed ankaŭ disfalado en malsamajn dialektojn, kaj fine malsamajn lingvojn. Estas kompreneble ke universala lingvo ne povas rajti imiti tian nenecesan ŝanĝiĝadon rapidan aŭ malrapidan. Ĝia funkcio kiel fidebla inter komunikilo en gravaj interrilatoj tutmondaj suferus tiom ke ĝi ne plu utilus. Esperanto do ne rajtas ŝanĝiĝi.

Unu el la kaŭzoj de ŝanĝiĝado en etnaj lingvoj estas la perdo de la konscia klarvido ante la ekzaktan signifon de la vortoj. Por eviti tion en universala lingvo, ĝi devas esti konstruita tia, ke la uzantoj devas konstante en sia konscio formi kaj ekzameni la signifon de ĉiu vorto kaj de kombinaĵoj de vortoj laŭ gramatikaj reguloj. Esperanto havas tian konstruon, ĉar per la riĉa vortformado la uzantoj devas konscie kaj daŭre kaj regule krei siajn vortojn. Se la Esperantistaro malpli kaj malpli kreas kaj uzas vorkombinaĵojn, alprenante anstataŭe nenecesajn neologismojn, ĝi perdos la kapablon pri la ekzakta signifokonscio, kaj aliigas sian lingvon en ŝanĝiĝeman kaj neprecizan idiomon iom similan al etna lingvo.


Universala lingvo devas esti fidinda. Se la Esperanto-uzantoj uzos esceptojn en la vortfarado, en la signifigado, kaj en la gramatikaj reguloj, ĝi ne plu estos fidinda nek utila. La esceptojn oni faras pro nesufiĉa konscio pri la reguloj koncerne la vortfaradon, la signifigadon, kaj la gramatikon, aŭ pro manko de kompreno ante tiujn regulojn. Tiu manko de kompreno estas plej danĝera se ĝi okazas ĉe niaj verkistoj, ĵurnalistoj, instruistoj, kaj lingvistoj, ĉar ilin imiti inklinas la bedaŭrinde malpli instruita Esperantistaro. Danĝerplene tiu manko de kompreno inter la t.n. specialistoj, tiuj ŝanĝemo, nesekvemo kaj esceptigemo ante gramatikajn kaj signifecajn regulojn estas granda kaj grandiĝanta, eĉ inter la lingvistoj kaj inter pluraj Akademianoj. Ili Esperanton ne nur ludas, sed eĉ ankaŭ mem fiksas la ludregulojn. La rezulto estas ŝanĝiĝo de la lingvo tia ke ĝi ne plu estas fidinda, kaj kaŭzas miskomprenojn en internacia komunikado, kaj krome kaŭzos la ridindigon ate de ne-Esperantistaj sciencistoj, kiuj ekkonos nian diletantismon.

Tiuj influhavaj Esperantistoj, kiuj enkondukas nenecesajn neologismojn, aŭ kiuj ne bone komprenas aŭ sekvas la gramatikon de Esperanto, estas la granda plejmulto, ankaŭ inter ĝiaj lingvistoj. Ilia preteksto por siaj emoj estas ke lingvo devas kreski, kaj adaptiĝi al ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj. Lingvo ne kreskas, ne pliboniĝas en tiu senco. Ĝi nur ŝanĝiĝas, kaj tion ne bezonas. La homa pensmaniero, la homa lingvouzo en si mem ne ŝanĝiĝas, nur la formoj de la lingvo povas, sed ne bezonas, ŝanĝiĝi. Kaj en Esperanto tiuj formoj, kiuj enhavas la vortformojn kaj la gramatikon, ne rajtas ŝanĝiĝi. Ĝi estus nur kosmetika ŝanĝiĝo. Certe nia teknika kresko enhavas novajn nociojn, relative malmultajn, kaj nur por tiuj la lingvo bezonas novajn vortojn. La etnaj lingvoj ĝenerale uzas ekzistantajn vortojn por tio, ne neologismojn, kaj Esperanto povus ofte fari la samon, aŭ krei por tio novajn vortkombinojn el ekzistantaj vortoj, aŭ krei neologismojn. Tiuj neologismoj, se oni opinias ilin necesaj, koncernus nur la novaĵojn teknikajn.

La forta tendenco de la Esperantistaro, pro la supre nomitaj kaŭzoj kaj pro neklaraj kialoj, estas krei grandan kvanton da nenecesaj neologismoj kaj malserioze trakti la gramatikajn regulojn tiel ke Esperanto estas jam fariĝanta, kiel la etnaj lingvoj, tro balastita por esti facile lernebla kaj tro nefidinda por utili kiel universala interkomunikilo. Kaj mi konsideras tiun fenomenon pli danĝera al la venko de Esperanto ol la ankoraŭ ĝenerala ignorado de la homoj. La "kvina kolono", la malamiko interna, jam estas tro multnombra.

Marcelo Leereveld.

Melburno, 25/5/1991.



"Estimataj, sur la 38a paĝo de L!93 mi trovis artikolon **"Pri ŝanĝoj en la lingvo"**. Ĝi estas perfekta. Eblus ĝin ankoraŭ kompletigi, ke oni novajn radikojn enkonduku nur, se ili estas nepre necesaj (maksimume nuancojn, neniam 100%-ajn sinonimojn), ĉar Esperanto bezonas ankoraŭ amason da neologismoj (fakaj) sed la nombro de literoj ne povas kreski.
Salutas Bartovská."

Letero de Kurt FISCHER, Germanio :

"Post paŭzo de kelkaj jaroj - la argumentoj mondperceptaj ŝajnis turniĝi en rondo - mi reabonis "Laŭte". Kvankam la malnova regurdado de vidpunktoj nek pruveblaj nek refuteblaj ankoraŭ ne ĉesis, mi tamen trovis kelkajn artikolojn tiel trafaj, ke mi ĝojus pli da frandi.

La artikolo "Ni savu la lingvon" de Henri Castiau meritas honorlokon en la studejo de ĉiu adepto de nia afero, precipe de niaj aŭtoroj. Nenion oni bezonas aldoni. Perfekte!

Same Oksana perfekte trafas la najlokapon sur la kampo de politiko kaj homaj rajtoj kaj digno.

Iom tre melankolie min impresas la artikoloj de Valo kiun pro liaj libretoj kaj artikoloj mi jam konas de multaj jaroj.

Valorus eble aldoni al "Laŭte" iom pli praktikan flankon ol ĝis nun ĝi havis. Sed eĉ sen tio, ĝi ŝajnas nun denove iom pli legebla."

## NUN AU NENIAM !

*Ni estas konvinkitaj, ke necesas nun profiti de la baldaŭa forigo de la landlimoj en Eŭropo por kuraĝigi la studadon kaj disvastigadon de Esperanto. Por tio, inter pluraj rimedoj ni celas :*

* *altiri la atenton ORIGINALE pri Esperanto ;*
* *donaci restadojn SENPAGAJN al junaj Eŭropanoj, por ke ili povu lerni en E-restadejoj.*

*Tiucele mi estas finanta jam trijaran verkon. Kiel filatelisto mi elektis inter miaj tabeloj de poŝtmarkoj el ĉiuj landoj kaj temoj 200 por eldoniĝi. La eldono enhavos por ĉiu kolorgravuraĵon, paĝon studantan landon, temon kaj identigantan ĉiun poŝtmarkon en franca lingvo kaj esperanto.*

*Mi estas maljuna kaj nova Esperantisto.*
*Por la tradukado en esperanton mi bezonos multe da tempo. Mi petas de Esperantistoj, kiuj estimas mian projekton, helpon por traduki, kaj mi dankas al ili anticipe.*

*H. Watenberg, 91 cité J. Moulin*
*F 34800 CLERMONT L'HERAULT*



## NEK AL IMPERIO, NEK AL IMPERIETOJ

*(responde al **Oksana** : "Ne al la imperio!" en L! 93)*

*En sia artikolo estimata Oksana patose pruvas, ke ĉiuj nacioj havas rajton de memdetermino, ke la eventoj en Litovio estas krimo; ŝi insultas Gorbaĉov-n kaj KGB-n k.s. Sed vane! Mi ja tute konsentas kun Oksana, ke ĉiu nacio havas estimindan rajton decidi ĉu esti aŭ ne en USSR (sed **nur** per tutpopola referendumo, ne per manifesto de iu ajn politika movado, eĉ sin konsideranta dekoble "popola"). Mi ankaŭ estas certa, ke la sangaj eventoj en Vilnius ne devus okazi kaj ankaŭ mia subskribo estas inter multaj miloj da aliaj sub la protestalvoko al sovetia estraro. Mi tute konsentas, ke oni ne devas murdi ĵurnalistojn aŭ pogromi redakciojn de neplaĉaj gazetoj (tion praktikas la "popola fronto de Moldavio" kaj prezidanto de sendependa Kartvelio, s-ro Gamsĥurdija). Miaopinie, vi tute prave diras, ke Gorbaĉov ne plu plene esprimas popolajn interesojn - ekonomiajn unuavice (sed ŝatata de vi Boris Jelcin politike estas ja lia kuzo kaj jam deklaris, ke en estontaj elektoj de USSR-prezidanto li voĉdonos por Gorbaĉov). Mi ankaŭ konsentas, ke KGB-aro ne estas tre agrabla kompanio ktp., k.a.,k.s..*

*Ĉefa ideo de mia letero estis jena: disfalo de USSR en nunaj cirkonstancoj (temas, certe, pri vera disfalo, ne transformo al alia naci-ŝtata strukturo, ne pri malpligrandigo teritorie k.s.) ne povas alporti bonon al popoloj loĝantaj nun en teritorio de Sovetio, nek al eŭrop-azia landaro. Kial ? Ĉar "elspezoj" de la disfalo, negativaj "subproduktoj" de malaperigo de USSR estos (ne por ĉiuj nunaj SU-civitanoj, certe, sed por **plimulto**) pli grandaj ol ĉiuj profitoj, kiujn oni ricevos rezulte de foriĝo de Sovetio. Kaj temas ne nur pri ekonomiaj negativaĵoj. Ekrigardu, ekzemple, kio estos en Ukrainio, se USSR disfalos kaj la respubliko estos "tutplene" sendependa. Unue Ukrainio (nun teritoria respubliko) havas realan ŝancon ankaŭ disfali. Jam nun en Galicio (Okcidenta Ukrainio) prosperas la vidpunkto, ke tiu teritorio povas kaj devas esti sendependa.("Kiev por ni ne ukazo", oni diras kaj*

kun plezuro ekmemoras pri "Zaĥidnoukrainsjka narodna respublika", ekzistinta en 1918-1919). Verŝajne Krimea duoninsulo (plimulte ruslingva, estinta ĝis 1962 en konsisto de Ruslanda federacio - ĝenerala sekretario de KPSU N. Ĥruŝĉov donacis ĝin al Ukrainio per unu telefonvoko) ankaŭ ekdeziros esti aŭ en Ruslando, aŭ, eble, kiel en romano de V. Aksjonov "La insulo Krime". Krome, en Ukrainio estas ne tute ukrainaj (etnografie) regionoj kaj jam nun inter ĝiaj loĝantoj estas ankaŭ adeptoj de aperigo de "Novorossijska respubliko" (Odessa-a, Nikolajev-a, Ĥerson-a, Korovograd-a, parte Doneck-a, Dnepropetrovsk-a, Zaporoĵje-a regionoj). Oni parolas ankaŭ pri suvereneco de Zakarpatje. Se konsideri, ke post "sendependiĝo" en la lando estas gvidantoj kutime ne moderecaj politikuloj, sed male - naciradikaluloj (vidu, ekzemple, historion de afrikaj ŝtatoj post 1961)... imagu, kia "kesto de Pandoro" malfermiĝos en Ukrainio. Krome, adeptoj de popola fronto de Moldavio jam nun parolas, ke Bukovina-o estas "samsanga moldava tero", kiu devas esti "amputita" de Ukrainio (kaj fama sovetia astrologo P. Globa prognozis, jen ja ŝtipo, ke ĝuste tio okazos). Ne forgesu, ke en Ruslando estas homoj (ankaŭ politikuloj) starantaj por Ruslanda federacio en limoj de 1945 (do, ankaŭ teritoriaj eblaj pretendoj). Kaj, por kompleteco, en iaj rondoj de Ukrainiaj naciistoj estas vidpunkto, ke Kubanj-o (suda Ruslando) ankaŭ devas esti ukrainia. Memoru, ke en Ukrainio loĝas 11 milionoj da rusoj - ĉu vi certas, ke s-roj Ĉernovil kaj Ĥmara garantios por ili trankvilan kutiman vivon, sen provoj de "ukrainiigo" (ne mi tiun vorton elpensis)? Aŭ ĉu ruslandaj adeptoj de la 1945-jaraj limoj ne provos uzi tiujn 11 milionojn por siaj politikaj ludoj? Do, ĉu ende malkaŝigi ukrainian "keston de Pandoro"? (kaj kazaĥian, kaj ĉiujn aliajn?) Kaj, la ĉefa demando, **por kiaj celoj**? Nu, certe, multaj homoj bonege scias por kiaj : por atingo de multnombraj postenoj en nova ŝtataparato (en ambasadorejoj ktp.), por fari fulmrapidan karieron en nova ŝtato (ja : nova ŝtato - novaj ĉefoj). Sed kiel pri interesoj de la plimulto, de t.n. "simplaj homoj" - kamparanoj, laboristoj, ne ĉefoj, ne politikuloj? Se temas pri la postulo "ukraina lingvo kaj kulturo havu ĉiujn eblecojn de evoluo" - sed kiuj en nuna USSR povas al tio kontraŭstari, ĉu fizike



ekzistas ekster Ukrainio (aŭ alia respubliko) tia forto? Ĉu, ekzemple, Gorbaĉov tian forton havas? Ha-ha-ha. "Junuloj soldatservu sur teritorio de Ukrainio" - jam plenumite. "Decidon pri konstruo de novaj atomcentraloj sur teritorio de Ukrainio akceptu parlamento de Ukrainio, ne kremlaj regantoj" - plenumite, la nuna ordo estas tia. "Homoj, kiuj krimis, pasigu sian punperiodon en Ukrainio" - baldaŭ estos plenumite, nun mankas malliberejoj. "Ukrainaj sportistoj ludu nome de sia respubliko, ne por gloro de USSR" - nu, futbaltaĉmento "Dinamo - Kiev" jam delonge ludis ekster USSR kiel reprezentanto de si mem, baldaŭ malaperos nocio "reprezenta teamo de USSR" (sed ĉu sporto de tio gajnos?) Nur blindulo (aŭ homo por kiu nezaleĵnistj-"sendependeco" estas memcelo, superhoma, superracia, supermorala) ne povas vidi, ke USSR de 1985 ĝis 1991 kardinale ŝanĝiĝis. Se paroli precize, la Sovetia imperio (ne, pli ĝuste - laŭ la politologo - **imperio de Kremlo**) jam disfalis. Pasis la tempo, kiam Kremlo havis absolutan potencon super la respublikoj, kaj estas reala ŝanco transformi USSR-n je nova naci-ŝtata konstruo, ligo, asocio, unuiĝo, komunumo de la popoloj. Kaj, ŝajne, la ukraina popolo (ne "Ruĥ", sed ukraina popolo) aspiras ĝuste tiel. Oksana, mi esperas, konas rezultojn de la referendumo de 17.03.1991. Plimulto da ukrainoj diris "jes" al **nova** USSR (certe, la nomo "USSR" malaperos), kvankam ne al tia speco de USSR, kiun volis M. Gorbaĉov.

Pri aliaj demandoj de la Oksana-a artikolo.

Certe, kiam Gorbaĉov diris pri USSR "nia miljara ŝtato" li eraris malklere. Ja USSR fondiĝis en 1922 (pli ĝuste en 1917-1921, dum civitana milito). Sed mi tute ne komprenis ideon de Oksana pri princo Jaroslav la Saĝa. Ĉu vi sincere opinias, estimata samideanino, ke li estis nacie **Ukraino** ? Rusiĉj-o li estis, reprezentanto de popolo, kiu ekzistis ĝis la 14-15aj jarcentoj kaj de kiu originis tri frataj popoloj : rusa, ukraina, belorusa. (Miaopinie, frataj ne nur en kultur-etnografia senco...) Do, "kian rilaton havis Rusoj al Kieva Rusjo ?" - rektan, kara samideanino, rektan kaj al Sankta Sofio, kaj al niaj kun vi samnomuloj Olga kaj Igorj,

kaj al Jaroslav, kaj al Vladimir,k.a. (Interalie, Rusoj **neniam** sin nomigis "moskali" kaj certe vi scias ke ili konsideras tiun finomon ne estima. (Se mi estus Ukraino, parolante kun Ruso neniam mi uzus tiun vorton).

Oksana skribis, ke USSR estas nur "alivestita Rusia imperio". Ĉu vere ? Estas centoj da diferencoj inter la ŝtato, kiu oficiale nomiĝis "Ruslanda Imperio" kaj USSR. USSR havas alian politikan reĝimon, alian ekonomion, alian socian strukturon, alian eksteran politikon, aliajn rilatojn inter la diversaj partoj de la lando, alian sistemon de ŝtatpovo, alian (se eble uzi tiujn vortojn) "internan ideon".
Ho, kiel estus bone por milionoj da homoj de 1917 ĝis nuna tempo, se USSR **vere** estus alivestita Ruslanda imperio - sen Gulago, sen Ĉe-ka, sen kolĥozigo, sen translogiko de popoloj al Siberio, sen artefaritaj malsategoj, sen "propiska" (eksterlandanoj ne scias, estas tia fia siaspeca fenomeno en USSR), sen "distriktaj komitatoj" (kaj aliaj komitatoj), sen eĉ "Centra Komitato"...

Oksana deklaris, ke en Ruslanda ŝtato ĝis 1917 regis "rusŝovinismo". Mi ne konsentas. Ĉu rusa popolo iam havis iajn avantaĝojn en la lando? (kiel brita popolo en Brita imperio, ekzemple). Jes, "Ruslanda imperio" ne estis demokratia. Sed ĝi ne estis "kolonia imperio" (kun metropola Ruslando kaj kolonioj aliaj). En ruslanda estraro estis homoj de diversaj nacioj (ĉu vi, ekzemple, povus imagi, ke membro de la Londona parlamento en la 19a jc. estis hindo? Neniu havis preferojn laŭ nacia signo. Jes, estis diversaj caraj troigoj, estis "malhonora" (kiel diris A. Solĵenicin) ukazo de 1876 kontraŭ la ukraina lingvo, estis aliaj agoj, ligitaj kun naturo de la aŭtoritata ŝtatpovo, sed ja ĝenerala linio de la Ruslanda ŝtato estas ne rusŝovinisma. Estis kialoj, pro kiuj Vladimir Solovjov, rusa religia filozofo, nomis Ruslandon "familio de popoloj" (Vladimir Lenin nomis alie - "malliberejo de popoloj"). Nu, kaj vera "malliberejo de popoloj" ekestis, certe, post la 1929-a jaro. Sed eĉ dum sovetia tempo, "kamero" de rusa popolo ne estis pli bona, ol "kamero" de popolo ukraina, latva, tatara, ĉuvaŝa, jakuta... "Imperio de Kremlo" **internacia** (eksternacia, sennacia, supernacia) estis.



Kiel pruvon ke rusa popolo estas nature ŝovinisma Oksana donas ideon pri "Moskvo-tria Romo", kiu estas kvazaŭ en fundamento ankaŭ de USSR. Ho, kion vi ekmemoris ! Ideondoktrinon, kiun aperigis en **1511(!)** monako Filofej-o. Koncepton unuavice religian (ĝi temis pri unikeco de Ortodoksio), ne ŝtatkonstruan. Se eĉ de ĝi ekstrakti aspekton ŝtatkonstruan, tiu aspekto estas ligita kun ideo de izoleco, ne de ekspansio. Ĉiuokaze jam en fino de la 17-a jarcento la doktrino estis forgesita. Ne, ne antikva ideo pri "Tria Romo", sed ideo pri "Tria Internacio" (en stalinisma formo) alportis tiujn plagojn al ukrainia popolo. Sed ĉu nur al ukrainia ? Ĉu Rusoj ne same estis persekutitaj ? Ĉu nur por Ukrainoj la jaro 1933 - jaro de artefarita malsatego - estis terura ? Ĉu vi forgesis pri Suda Ruslando ? En Ruslando estis artefarita malsatego ankaŭ pli frue, en Apudvolgio. Ĉu, finfine, esperantistoj en 1938 en Sovetio estis subpremitaj laŭ nacia aparteno ? Do, ne gurdu pri kvazaŭa enkorpiĝo de rusa ŝovinismo je sovetia ŝtatpovo kaj politika reĝimo. Se tio estis ŝovinismo - siaspeca, "kremla", "centrakomitata", "ĉe-ka'a" k.a.

Oksana skribis, ke en baltaj respublikoj estas rusoj, kiuj nomas lokajn lingvojn "hundaj". Mi ne komprenas, por kio Oksana tion diris. Nu jes, verŝajne estas tiaj rusoj, eĉ plu : estas rusoj - ŝtelistoj, rusoj - rabistoj, rusoj - monfalsistoj k.a. (same kiel latvoj, ukrainoj, litovoj, kartveloj de tia speco). Kaj kio ?
Oksana konsilas al rusoj en baltaj respublikoj konduti kiel nacia minoritato. Interalie, ekzemple, en Latvio tia minoritato ne tre estas "minoritatema" (48 % da loĝantoj). Sed rusoj en Ĉebaltio ĝuste por tio batalas, por rajto de minoritato (certe, en civiliza senco, laŭ la Deklaracio de homaj rajtoj). T.e. pro **egalaj rajtoj** kun t.n. origina loĝantaro. Kontraŭ **etnokratia** ŝtato, kontraŭ la ideo laŭ kiu Litovio estas posedaĵo unuavice de litovoj kaj nur poste - de "aliaj", Latvio - tero de latvoj (slogano de Latvia popola fronto : "Por latva Latvio!"), Estonio - de estonoj, kaj se vi ne feliĉis naskiĝi estono - estu duaranga civitano. Kaj ne nur pro tio rusoj en Estonio ne povas fulmrapide (laŭ leĝo pri lingvo ŝtata) ellerni la estonan lingvon, ke en la estona

*lingvo estas 14 kazoj kaj en la rusa - 6. La estona estraro ne volis, ke rusoj konu la lingvon, ĝi volis, ke rusoj agu laŭ la popolfronta slogano : "Valizo, stacidomo, Ruslando". (Tion leganta eksterlandano povas pensi : kia bagatelo - ŝanĝi loĝlokon. Ve, en USSR tio estas pli ol problemo pro ĝiaspecaj ekonomiaj kondiĉoj). Sed por justeco necesas diri, ke ĝuste la estona estraro lastatempe ŝanĝis la intencon kaj prudente "forgesis" pri malmolaj postuloj de la leĝo pri la ŝtatlingvo. Bonaj rezultoj de tio ne devigis sin atendi.*

*"Mi ne scias, pri kiu diskriminacio de "neoriginaj popoloj" parolas Igorj", - skribis Oksana. Sciu : pri diskriminacio de rusoj, ukrainoj, gagauzoj en Moldavio ; armenoj en Azerbajĝano, azerbajĝananoj en Armenio ; poloj en Litovio ; rusoj en baltaj respublikoj ; rusoj en Tuvio ; uzbekoj en Kirgizio; kirgizoj en Uzbekio ; osetinoj, abhazoj en Kartvelio ; rusoj kaj aliaj slavoj en Kazakstano, kaj longa listo povas esti. Kaj tio - nur de gazetoj, verŝajne mi ne ĉion scias. Kaj kulpas pri ĉio unuavice la ideo de* ***etnokratia*** *ŝtato, de latva Latvio, de litova Litovio, de moldava Moldavio, ideo de "propra nacia ŝtato". Certe, ne nur tia ideo, sed grandmezure ĝi. Pli frue estis unu utopio - "proletara ŝtato" (fundamento de ŝtato - unu klaso). Nun - alia utopio - "nacia ŝtato" (unu nacio faris fundamenton por ŝtateco). Neniu (preskaŭ) en sovetiaj respublikoj parolas pri "civitana ŝtato". Kaj "nacia ŝtato" en la nunaj, postsocialismaj cirkonstancoj povas esti nur maldemokratia, povas esti nur "imperieto". (Vidu Karvelion kiel tre karakterizan ekzemplon). Ĉiuj estraroj en la sovetiaj respublikoj ne subskribontaj Unian pakton nun unuavice zorgas pri "ŝtata propraĵo", tute ne pri ekonomiaj reformoj. "Nacia ŝtato" (= nacia ŝtataparato) devas, certe, esti forta! Ankaŭ privatigo, kie ĝi komenciĝis, iras tiel, kiel estas komforte por la ŝtata burokrataro. Do, estis farita ( de Stalin k.a.) "malliberejo de popoloj" - ĉu estos nur izolitaj kameroj anstataŭe ?*

*Kio koncernas kelkajn atombombajn respublikoj post disfalo de USSR - vane Oksana ne konsideras tion serioze. Ja interparolo pri tio* ***jam*** *estis en Supera Soveto, deputatoj postulis dividi (en okazo de malaperigo de USSR) oran rezervaĵon de USSR kaj, jes, atombombojn. (Tio okazis, kiam spontane ekestis disputo pri la fama artikolo de Solĵenicin.)*



*Oksana koleras, ke "la mondo ĉiam parolis pri "rusoj"( kvankam S. Koroljov, kun lia tipe rusa familia nomo, estis ukraino). Ĉu por ŝi estas agrabla la fakto, ke Trofim Lysenko-n "la mondo" ankaŭ, sendube, nomis "ruso", kvankam li estis pursanga ukraino ? (T. Lysenko en 1930-j jaroj organizis subpremadon kontraŭ senkulpaj sovetiaj sciencistoj, li "mortigis" la sovetian genetikan sciencon kaj faris aliajn krimojn). Kaj ĉu nepre nececas klarigi la nacian apartenon de tiu aŭ alia genio ? Oksana, verŝajne, estos treege surprizita, sed por mi (nu, certe, ankaŭ por multaj, multaj aliaj) tute indiferente estas, kiu estis laŭ nacio eĉ la homo elpensinta jenan lingvon.*

***Igorj el Ruslando***

## PRI ŜULCAĴOJ

En L! 93 (p.37) iu demandis pri la vorto "ŝulcaĵoj". Ŝulco Rikardo estas konata germana Esperantisto kaj la plej konata reprezentanto de la tiel nomata "Analiza Skolo". La Analiza Skolo ne estas skolo en la normala senco de tiu vorto ; ĝiaj anoj estas ĉiuj Esperantologoj, kiuj kredas, ke estas pli grave sekvi la **logikon** ol la **uzadon**. Tiaj homoj evitas do jam tradiciajn esprimojn, kiuj estas "kontraŭlogikaj" (ekzemple : dank'al), favore al pli Fundamento-konformaj ekvivalentoj (ekzemple : danke al).

Ŝulco Rikardo (kies germana nomo estas "Richard Schultz") propagandas multajn opiniojn, kiuj rilatas al la Analiza Skolo, sed kiuj ne necese apartenas al ĝi. Tio estas : Oni povas "membriĝi" en la Analizan Skolon ne samopiniante pri ĉio, kion diras Ŝulco. Unu el tiuj opinioj, kaj verŝajne la plej flamiga el ili, estas lia opinio pri la Esperantigo de propraj nomoj. Li forte insistas pri ĝi, skribante ekzemple "Fongojto" kaj neniam "Goethe".

Liaj oponantoj ĉiam troigas la Ŝulcan sintenon pri Esperantigo de propraj nomoj. Kompreneble li neniam asertis, ke Esperantistoj skribu adresojn Esperantlingve. Ŝajnas al mi, ke lia opinio pri fremdaj nomoj en Esperanto ne multe diferencas de mia opinio, kiun mi resumas jene :

(1) Fremdaj estas ĉiuj vortoj, kiuj enhavas ne-Esperantajn literojn, aŭ kiujn oni prononcas alie ol laŭ la reguloj de

Esperanta prononco.

(2) Oni skribu fremdajn vortojn per kursivaj literoj. Se oni ne disponas pri kursivaj literoj, oni uzu almenaŭ citilojn.

(3) Se homo aŭ loko havas konatan Esperantan nomon troveblan en la vortaroj, oni uzu ĝin (ekzemple : Varsovio, Ŝekspiro). Se oni pensas, ke iu leganto ne rekonas la nomon, oni aldonu la nacilingvan nomon en parentezo; post la vana uzo de la Esperanta nomo. (Ekzemple, nesperta Esperantisto eble ne konos la nomon "Hago", kvankam ĝi estas en PIV.)

(4) Se homo aŭ loko ankoraŭ ne havas konatan Esperantan nomon, kaj oni intencas multe skribi aŭ paroli pri ĝi, aŭ oni pensas, ke diverslandaj Esperantistoj eble volos paroli pri ĝi, oni decidu mem pri Esperanta nomo. Oni ĉiam konsideru jam uzitajn formojn, se ili ekzistas. Ekuzante la Esperantan nomon, oni nepre aldonu la nacilingvan formon parenteze post la unua uzo.

Ne gravas, se dum kelka tempo ekzistos pluraj Esperantaj nomoj por la sama afero (ekzemple : Fongojto, Gojto, Goeto); iam la uzado decidos pri la plej bona formo. Pli gravas, ke diverslandaj Esperantistoj povu senĝene paroli pri la mondfama verkisto Fongojto ("Goethe") eĉ se pluraj el ili ne lernis prononci la vokalon en la unua silabo de la germana nomo.

(5) Se homo aŭ loko ankoraŭ ne havas konatan Esperantan nomon, kaj oni ne intencas multe uzu la nomon, kaj oni ne opinias, ke la nomo devas esti internacie konata, oni uzu la nacilingvan nomon. Sed oni skribu ĝin kursivlitere (aŭ almenaŭ en citiloj), por ke Esperantistoj, kiuj ne scias tiun nacian lingvon, ne estu ĝenataj aŭ konfuzataj.

Memoru, ke Esperantistoj, kies nacia lingvo ne uzas latinajn literojn, ofte tute ne konas la nacilingvajn formojn de okcident-eŭropaj nomoj kiel "Boulogne" aŭ "Edinburgh", same kiel multaj okcident-eŭropaj Esperantistoj ne scias skribi la ĉinan nomon de Pekino aŭ la kartvelan nomon de Tifliso. (Verŝajne legos tiun ĉi frazon eĉ homoj, kiuj ne scias, kiel aspektas la kartvela alfabeto.)

**E.T. Grimley Evans**





## KIA SOCIALISMO ?
## KIA KLASBATALO ?

**Patriko :**

*Ni estas travivantaj (r)evoluciajn privilegiajn tempojn sub konjunkcio URANO-NEPTUNO kiu elfinas en 1992 ciklon ekintan en 1821, jaro de la lasta konjunkcio URANO-NEPTUNO kaj de la morto de Napoleono, inter la malkovroj de URANO dum politika, burĝa revolucio kaj de NEPTUNO dum socia, proleta revolucio en 1789 kaj 1848. Tiu 171-jara ciklo estis tiu de industria-kapitalisma-imperiisma periodo regita de anglo-usonanoj.*

*La ĵus okazintaj eventoj en Sovetio respondas al alia konjunkcio SATURNO-NEPTUNO en 1989 jam okazinta dum la Oktobra Revolucio kaj ree dum la mortigo de Stalin.*

*Kiam ni aludas socialismon, homrajtojn, demokration k.s., ni faras tion reference al materialisma periodo kiu cikle revenas post 2160 jaroj. Tiu 2160-jara tempo estas dekduona parto de la tria movado de la Tero t.e. la retroirado (precesio) de ekvinoksoj kies ciklo ĉirkaŭas 26000 jarojn kaj kiu trairas ĉiujn signojn de la zodiako. Ni eliras el la Fiŝoj kaj eniras la Amforon.*

*La forpaso de la materialisma periodo signifas ke ni plene eniras la novan eraon kiu nepre manifestiĝu per religia vekiĝo. Same kiel la materialisma periodo estu kondamno/kritiko de la valoroj/kredoj/mitoj de la pasinta erao, la religia vekiĝo estu kondamno de la valoroj de la materialisma periodo...*

*Se la valoroj de ĉiu erao estas necesaj por la evoluo de la homaro, tiuj de la materialisma periodo utilas nur por faligi la jam kadukiĝintan forpasantan eraon kaj tuj riveliĝas iluzioj...*

*Religia vekiĝo signifas ke ni pro neceso ree kaj alinivele konsciiĝu pri tio grava, profunda, vera, esenca, aŭtentika, rezigninte pri niaj fantaziaĵoj, egoismoj, vantecoj kaj vanecoj, pri la iluzio ke materio estas tuto kaj la homo estas dio...*

*La realo ne povas reduktiĝi al tio, kion ni kredas aŭ deziras ke ĝi estu. Tute male, ni estas parto de tiu nekonata*

*realo, kun nia propra funkcio rilate al ĝi, kio ankaŭ estas la kialo de nia surtera ekzistado.*

*Pri la metita demando pri socia ordo, mi diru ke ne eblas iu plibonigo de la socio sen pliboniĝo de ĉiu homo kiu konsistigas la socion, ĉar la socio estas nenio plie ol la sumo de la homoj kiuj konsistigas ĝin, ĝi estas eĉ malplie pro tio ke la solvo venas el individueco kaj ne el socieco.*

*Tial la neceso pri religio kiun postulas socio kaj eĉ ekologio. Ĉu ĝin alportos Islamo, post malapero de materialismaj kapitalismo kaj komunismo, post forĵeto de la gaĝetaj komputoroj? Necesas ke estu detruita la nova AKKAD-KARTAGO-USONO kaj fortikigita la nova PERSIO-ROMIO-RUSIO. Ĉar venis la tempo kiam la DRAKO-ISLAMO post 1260 jaroj (732, ĉesigo de la islama ekspansio en Puatje (Poitiers), Francio + 1260 = 1992) elmanĝu la filojn de la VIRINO-FRANCIO. Tiam en la nova ROMIO-SOVETIO, la nova farizea establita religio naskos novan mesianismon.*

*Kaj kiu rimarkis ke la koloroj de la Iraka flago samkiel de aliaj arabaj landoj (Palestinio, Kuŭajtio, k.a.) estas la koloroj de la kvar ĉevaloj de la Apokalipso?...*

**Pako :**

La demandoj per kiuj Garolo titolas ĉi debaton igis min, unue, ekpensi pri la socio kie aperis la konceptoj klasbatalo kaj socialismo, kaj ĝin kompari kun la nuna okcidenta, ĉar en okcidento naskiĝis ambaŭ. Sed legante la disvolviĝon de lia enkonduko, mi ekkomprenas ke la celo de la demandoj estas enketi la utilon aŭ neutilon de ĉi tiuj fame konataj ideoj en la nuna forvelkanta mondo por la aktuala homaro.

Mi, kiel kutima leganto de la artikoloj kaj libraj verkoj Garolaj, ankoraŭ miras pro lia kapablo verŝi la plej pesimismajn - se ne diri malamajn - frazojn pri la homoj, ties konduto kaj estonto. Sed mia miro iĝas en timon kiam mi, taksante iun lian ideon prava, alvenas al konkludo plej maldemokratema. Nu, ĝuste tio okazas ĉi-kaze. Mi eble estas komunisto, ĉu?

Nu mi ordigu miajn ideojn por ke, almenaŭ je la fino, la legantoj komprenu min. Se eki per la komenco, tio estas, en la okcidenta industria socio, evidentas ke la socialismo estas en krizo, eble tial ke perdiĝis la koncepto klasbatalo ekde kiam oni ne plu scias kiuj konsistigas la laboristan klason. Mi persone plurfoje sentas ke certaj sin nomantaj laboristoj uzurpas ĉi vorton, des pli kiam ili fiuzas klasbatalan ilon kiel la strikrajton por defendi privilegiojn - eŭfemisme "akiritajn rajtojn" - aŭ postuli malsolidarajn plibonigojn - eŭfemisme "justajn petojn". Ne necesas do esti aparte reakcia por vomi antaŭ klasbatalo, laboristoj, socialismo, ktp, konceptoj principe kaj komence altvaloraj, sed nuntempe prostituitaj, malplenaj je ajna progresma signifo.

Ĉio ĉi pli okulfrapas, se oni rigardas la rilatojn inter la Tria Mondo kaj okcidento, kies "laboristoj" profitas la malsaton kaj malriĉecon de la plimulto de la homaro. Eĉ eblas dubi pri tio, ke ni solidare helpu la centr- kaj orienteŭropanojn.

Resume, ĉi unua penso kiu venis en mian kapon rilate ĉi tiun debaton konsistas el tio, ke en la evoluintaj landoj, kiujn mi kutimas are nomi Okcidento, la laborista klaso ne plu ekzistas, almenaŭ laŭ la originala senco. Kaj kvankam oni plu vidas en tiuj socioj la ekspluatadon propran al kapitalismo, estas same evidente ke ĉi riĉaj ekspluatatoj estas multe pli proksimaj, sociale, al siaj ekspluatantoj ol al la triamondaj laboristoj. Ja ĉi tiuj estas nuntempe la klaso al kiu socialismo celas utili.

Sed la grava demando kiun Garolo starigas en sia enkonduko ne estas la titolo de nia debato. Kiam li prave bildigas la teruran staton kaj antaŭvideblan estonton de la ekologio antaŭ la demografia premo homa, tiam li eniras la kernon de sia sugesto por debato. Ĉu la Tero sin savos per demokrata decido de 6.000 milionoj da analfabetoj, aŭ malmultaj kleruloj konsciantaj pri la problemego trudi al ĉiuj la ĝustan vojon? Jen la demando, kiun mi, sincere, ne kuraĝas respondi.

**Jean-Claude** : *Pri tiuj temoj mi tute ne kompetentas. Tamen ŝajnas, ke la ĝisnunaj sintenoj - do sistemoj - montriĝas grave senpovaj.*

*La rapida kresko de la homnombro kaj ties teknikoj klare*

*rivelas, ke la rilatoj interhomaj ne plu povas funkcii konkure.*

*La malnova kredo, laŭ kiu nur konkurado estigas progreson, pli kaj pli aspektas danĝera. Urĝas, ke la homoj lernu kunkuri ĉar, multe pli ol la najbaroj, la defiantoj estas la problemoj metitaj de la homa aktivado. Tiuj problemoj hodiaŭ mondskalas, kiel sciate.*

*Por batali, plu estas pli ol fareble.*

## Pri : "PROVO DE KLASIFIKO"

*En la artikolo de VALO "**Provo de klasifiko**" (L!94), mi rimarkigos jenon pri la punktoj 4 kaj 6.*

*Esperanto vivos (venkos) nur se ĝi estos vera lingvo por ĉiuj, do parolata ankaŭ de la malamikoj.*

*Ekz. : La germana lingvo neniom suferis pro la fakto ke multnombro el ĝiaj parolantoj ne malhelpis, eĉ aprobis naziismon.*

*Do, oni ne devas apartigi Esperanton disde la ne-esperanta vivo.*

*Tamen gravas la **homaj rajtoj**. (Mi uzas tiun esprimon anstataŭ **politiko**, ĉar politiko ŝajnas (eĉ povas esti) ĉu bona ĉu malbona, sed ne estas kialo por esti senpolitika. Senpolitikulo estas scie aŭ nescie egoista indiferentulo.*

*Mi aprobas la Esperantan Neŭtralan Movadon, ĉar ĝi estas necesa (por antaŭeniro de Esperanto en ĉiuj medioj, por konvinki ke Esperanto estas lingvo por ĉiuj, sed mi bedaŭras ke multaj homoj estas indiferentaj al malbonaĵoj de la vivo en la mondo.*

*Estas homoj, kiuj nomiĝas "veraj esperantistoj", tamen ili fakte apartenas al inerta amaso.*

*Oni povas subteni neŭtralan E-movadon kaj samtempe agi, ĉu pere de la neneŭtralaj E-movadoj, ĉu pere de la ne-esperantaj movadoj.*

*Rilate al la simpatiantoj (al Esperanto - punkto 4 de Valo) ni rimarku, ke kelkaj el ili estas agantoj por la homaj rajtoj. Mi pensas eĉ, ke ĝuste en tiu medio ni havas plej da simpatiantoj.*

*Ili ne lernas, eĉ ne lernos Esperanton, ĉar ili okupas alie sian deĵoran tempon aŭ/kaj/ĉar Esperanto ne alportas al ili utilon. Sed ĉu ni povas diri al ili, ke iliaj laboroj por savi homojn (torturatoj, mortmalsatantoj ktp.) ne urĝas kaj ke ili povas elpreni tempon por lerni Esperanton, partopreni kongresojn kaj lokajn kunvenojn ?*

*Plie, mi pensas, ke se ni havus kontaktojn kun homoj, kiuj jam lernis Esperanton, sed ne plu agas en la esperanta movado, ni povus ekscii, ke kelkaj el ili (kiom?) nun aktivas pri homaj rajtoj.*

*Eĉ ne eblas dubi, ke kelkaj eksindiferentaj homoj kiuj ekkonis Esperanton, fariĝis poste batalantoj por plibona homaro.*

*Kvankam la esperantistoj, kiuj estas indiferentaj al aliaj aferoj (homaj rajtoj - **homaranismo**) pensas, ke necesas nur disvastigi Esperanton, mi pensas, ke ni ne povas apartigi Esperanton disde la batalo por plibonigita kaj pli justa homaro.*

*Kiuj estas simpatiantaj nur al Esperanto - eĉ se praktikantaj esperantistoj - kaj estas indiferentaj al aliaj mondaj problemoj (malliberecο, malsato, ktp.) tiuj ne estas tre interesaj, kvankam la lastaj plinombrigas la esperantistojn. Male, la simpatiantoj (eĉ la simpationtoj) kiuj agas sur aliaj terenoj, povas helpi la progreson de Esperanto kaj eble lernus la internacian lingvon, se ĝi fariĝus utila al iliaj celoj.*

**L.A.**

*****************************************************

**JORGOS** invitas ĉiujn al (ne-nur-) Esperanta duontago : de komuna tagmanĝo ĝis nokta dancado Sabaton 21-an de Septembro '91 pro duobla inaŭguro - fare de urbestraro - de piknikejo : "AIRE ESPERANTO - langue universelle" kaj de migrad-pado por pied-marŝemuloj, pad-bicikloj kaj ĉevaloj.

Pliaj informoj ĉe JORGOS, F 09120 St FELIX Rt.

Gratul-poŝtkartoj al pacisteca urbestraro :

Conseil Municipal de Laroque d'O.
aux bons soins de MJC-ESPERANTO ĉe M. Georges COMTE
F 09120 SAINT FELIX DE RIEUTORT

Majoro COUSTEAU

# DEKLARACIO PRI RAJTOJ DE VENONTAJ IDAROJ

**1.** La venontaj idaroj rajtas ricevi sendomaĝan, neinfektitan Teron. Ili rajtas ĝui tiun ĉi, konsiderante ĝin apogilo de la historio de Homo, de kulturo kaj de sociaj ligiloj. Tiuj ligiloj igas ĉiujn generaciojn, ĉiujn individuojn anoj de Homaro.

**2.** Ĉiu generacio dependas de havaroj kaj heredaj posedaĵoj. Ĝi nepre devas, kiel kuratoro nome de venontaj idaroj, malebligi ĉian neripareblan kaj neinversigeblan trafon kontraŭ la surtera vivo. Ĝi nepre devas lukti por la respektindeco, la libereco de Homo.

**3.** Sekve, dependas de superega devo de ĉiu generacio, por konservi la rajtojn de venontaj idaroj, kontrolŝirmi senfendajn evoluojn kaj aliigojn de teknologio, kiuj riskus malservi surteran vivon, laŭnaturan ekvilibron, aŭ harmonian elvolviĝadon de Homara Genro.

**4.** Ĉiuj utilaj rimedoj, inkluzive de instruado, esplorado kaj leĝaro, nepre devos esti utiligataj por garantii tiujn rajtojn kaj certigi ke ili ne estos oferitaj pro facileco, pro nur momentaj profito aŭ oportuno.

**5.** La estraroj, la neregistaraj organizoj kaj la individuoj estas insiste alvokitaj por ekde nun diligente apliki tiujn principojn, kvazaŭ ili frontus jam tiujn estontajn generaciojn, antaŭ kiuj ili plene respondecas.

Majoro COUSTEAU sugestas al la Francoj aprobi tiun deklaracion kaj sendi ĝian francan tekston (troveblan en 'Almanako Cousteau) al sia deputito. La ĉi-supran tradukon eblas sendi al eksterfranciaj samideanoj.





# VORTOJ DE MALJUNULO

**valo**

## SCIENCO KAJ RELIGIO

*Nu, la nomojn skribis mi, Longley uzas* ***anglajn****, ne botani-kajn, kvankam certe li ĉerpis ilin el faka konsultlibro. El faka libro, ne herbapoteka : duobla perdo, ke verŝajne nur en l'irlanda la tieaj floroj havas ĝenerale konatajn komun-ajn nomojn, kaj krom tio ke certe l'anglaj nomoj perdis riĉan fonon de kuracaludoj. Ĉar laŭvorta traduko sonus iel tiel :* ***rubroberĉjo, sankroberta herbo*** *(Roberto aŭ Ruperto estis eble irlandano kiu episkopis en Salzburg en l'oka jar-cento - li disvolvis la salminejojn - kaj efikis kontraŭ sangantaj vundoj, ulceroj kaj erizipelo),* ***dipatrinlitpajlo*** *(la Virgulino kuŝis sur galio kaj filiko kune : filiko ne agnoskis la naskon de Kristo, do perdis siajn florojn, galio bonvenigis kaj ekfloris flave anstataŭ blanke),* ***flankdolorkuraco, solvo-porkonfliktoj...***

*Kaj diantoj, angle* ***carnations****, komencas aspekti* ***enkarniĝoj*** *sen en-...*

**************************************************************

## NASRUDIN

Pluvegis. Piafektulo kuris al ŝirmejo.

"Ĉu vi aŭdacas forkuri de l' abundo de Dio", Nasrudin kriis kontraŭ li, "l' akvo de l' ĉielo? Vi estas piulo, ĉu vi ne scias, ke pluvo benas ĉion kreitan?"

"Tiel mi neniam antaŭe penis", la piulo balbutis; li malpli rapide paŝis kaj hejmenvenis trempite.

Baldaŭ poste li sidis ĉe fenestro, vindite per drapoj ĉar li malvarmumis ; vidante, ke Nasrudin kuras tra la pluvo, li provokis lin : "Kial vi forkuras de l' dia beno, Nasrudin? Ĉu vi malestimas ĝin?"

"Ha", Nasrudin diris, "vi ŝajne ne komprenas, ke mi ne deziras makuli ĝin per la piedoj."

La azeno de Nasrudin kuris al lageto por trinki. La bordo estis tre kruta, kaj l' azeno preskaŭ perdis ekvilibron kaj enfalis - sed ranoj komencis laŭte kvaki en la akvo.

Tio timigis la azenon, kiu baŭmis kaj tiel savis sin.

Nasrudin ĵetis monerojn en la akvon, dirante : "Ranoj, vi helpis min : do festu!"

**************************************************************





# FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO

de Petro USPENSKO (OUSPENSKY)

(resumpecoj)



## LA VOJO (al superaj statoj de konscio)kaj LA INFLUOJ

(El la 10ª ĉapitro)

Kie komenciĝas LA VOJO?Ne sur la sama nivelo sur kiu disvolviĝas nia vivo, sed sur tre supera nivelo.

La homo vivas sub la leĝo de l'akcidento,kaj sub du klasoj de influoj(kiuj dependas ankaŭ de l'akcidento): Influoj de la 1ª klaso (Influoj A), kreitaj en la vivo mem fare de la ekstera aŭ ekzotera cirklo de l'meĥanika homaro (Eduko, familio, nacio, socio, raso, okupo, ordinaraj ideoj, kutimoj, ktp.) Influoj de la 2ª klaso (Influoj B) kreitaj ekster ĉi tiu vivo fare de l'interna aŭ esotera cirklo de l'konscia homaro. Ĉi tiuj influoj malsamas de la unuaj, ĉar ili estas KONSCIAJ en sia origino, nome, kreitaj konscie fare de konsciaj homoj, kaj ili alprenas la formon de religiaj doktrinoj aŭ instruoj, filozofiaj sistemoj k artaj verkoj. Ĉi tiuj influoj, ĉe eniro en la vivon, miksiĝas kun la influoj de la 1ª klaso, k foje iel konfuziĝas kun ili.Ĉe eniro en la vivon, ili restas sub la leĝo de l'akcidento, nome, ili komencas agi meĥanike, nome, povas aŭ ne agi super iu homo. La rezultoj de ĉi tiuj influoj akumuliĝas en la homo k ekformas lian magnetan centron.


MAGNETA CENTRO: Kapablo distingi la 2 klasojn de influoj k altiri la influojn de la 2ª klaso (kiuj taŭgas al li por orientiĝo kaj kontrolo), tiel la magneta centro grandiĝas kaj tiam la homo komprenas la ideon pri la vojo kaj komencas serĉi ĝin.

Li povas trovi alian homon kiu konas la vojon.En ĉi tiu kazo, la influo estas rekta kaj konscia. Ĝi estas influo de 3ª klaso (Influo C).

La influoj B (kiuj kreas la magnetan centron) estas konsciaj en sia origino, sed ĉe miksiĝo kun la influoj A, ili falas sub la leĝon de l'akcidento. Ili venas al ni tra libroj, en nerekta formo. La influoj C tute eskapas de la leĝo de l'akcidento. Ili alvenas per buŝa transdiro, en rekta formo.

La momento en kiu homo renkontas alian homon kiu ko-

nas la vojon, nomiĝas la 1ª ŝtupo aŭ 1ª sojlo. Ĉi tie komenciĝas la ŝtuparo, nome, inter la vivo k la vojo estas la ŝtuparo :




La homo alsupras ĉi tiun ŝtuparon helpe de sia gvidanto. Post la lasta ŝtupo, komenciĝas la VOJO, sur tre alta nivelo super la ordinara vivo.

Ni priparolas, kompreneble, la veran magnetan centron, la veran gvidanton kaj la veran vojon. Kiam la magneta centro estas malbone formita (ĉar ĝi inkludas influojn A kvazaŭ ili estus influoj B), ĝi ne donas la veran orientiĝon, kaj sekve, oni ne povas trovi la veran vojon.

Laŭ ĝenerala regulo,la disĉiplo mem valoras neniom, sed li ne volas alian majstron kiu ne estas Jesukristo mem!!! Majstro de pli malalta kategorio ne estas digna de li!!!


NEFLEKSEBLA LEĜO: Ju pli granda estas la majstro, des pli malfacile estas sekvi lin!!!

Neniu povas leviĝi al supera grado de l' eskalo (aŭ ŝtuparo)antaŭ ol li lokigos iun en sian propran lokon! Tio signifas ke oni havas la devon varbi tiujn kapablajn sekvi la 4an VOJOn,ĉar la Interna (=Esotera) Cirklo de l'Konscia Homaro nutriĝas de l'Ekstera (=Ekzotera) Cirklo de l'Meĥanika Homaro.(*)

(*) En simila maniero,Esperantujo (=Cirklo de l' Verda Homaro) nutriĝas el Eksterujo (= Mondo de l' Bunta Homaro)!



DIAGRAMO DE INFLUOJ




LA SCIO KOMENCIĜAS PER LA INSTRUO DE LA KOSMOJ

MAKROKOSMO - granda mondo - UNIVERSO
MIKROKOSMO - eta mondo - HOMO

Sed oni konsideras ke ĉi tiu doktrino de 2 kosmoj estas nekompleta.

"Kiel estas supre, tiel estas malsupre" Ĉi tiu principo de la TABELO DE SMERALDO (de Hermeso Trismegisto) temas pri la kosmoj.

La kompleta doktrino parolas pri 7 kosmoj:

| | | |
|---|---|---|
| PROTOKOSMO | - 1ª kosmo - | ABSOLUTO |
| AĴOKOSMO | -Sanktakosmo,Megalokosmo- | ĈIUJ GALAKSIOJ |
| MAKROKOSMO | - Granda Kosmo - | NIA GALAKSIO |
| DEŬTEROKOSMO | - 2ª kosmo - | SUNO |
| MEZAKOSMO | -kosmo (inter)meza- | PLANEDOJ(inkludita la TERO) |
| TRITOKOSMO | - 3ª kosmo - | HOMO |
| MIKROKOSMO | - eta kosmo - | ATOMO (mikrobo) |

Por funde koni iun kosmon, oni devas koni la du apudajn kosmojn, tiun super ĝi kaj tiun sub ĝi. Ĉi tiuj 2 kosmoj determinas la 3-an, kiu estas inter ili, ekzemple: la Mezakosmo (Planedoj)kaj la Mikrokosmo (atomo), konsiderataj kune, determinas la Tritokosmon (Homon).

En sia ordinara stato, homo konscias pri si mem en UNU SOLA KOSMO. La disvolviĝo de lia konscio kaj la intensiĝo de liaj psikaj funkcioj, permesas al li kompreni la vivon de aliaj kosmoj simultane unu pli granda k alia pli malgranda, unu super li k alia sub li.

Jen la aforismo:"La vojo,kiu alsupras,estas samtempe la vojo, kiu desupras." Ĉi tio signifas ke la konscio de homo, kiu ekzemple transiris al la nivelo de l'planedara mondo, simultane atingis la nivelon de l'atoma mondo;kiam homo komencas senti la vivon de l'planedoj, li komencas samtempe senti la vivon de l'atomoj.

La rilato de nulo al infinito (en geometrio)estas la rilato de punkto al linio, de linio al surfaco, de surfaco al solido, de solido al kvardimensia korpo,k.t.p. Se ni konsideras la atomon -aŭ la mikrobon- (mikrokosmon) kiel punkton, sekve en rilato kun tiu punkto,homo estos linio, nome, unudimensia figuro. La sekvanta kosmo (Tero), en rilato kun la homo, estos surfaco (2 dimensioj); la Suno (Sun-sistemo),en rilato kun la Tero, estos 3-dimensia; nia galaksio havos 4 dimensiojn por la Suno; ĉiuj galaksioj estos 5-dimensiaj,k la Absoluto aŭ Protokosmo, 6-dimensia.

LA DIMENSIOJ: 3 SPACAJ DIMENSIOJ K 3 TEMPAJ DIMENSIOJ, laŭ USPENSKO:

NUL dimensio: PUNKTO

La 3 spacaj dimensioj: 1ª: linio
2ª: plano aŭ surfaco
3ª: volumo




NUL dimensio: MOMENTO

La 3 tempaj dimensioj: 4ª: tempolinio
5ª: tempoplano
6ª: tempovolumo


La 3 tempajn dimensiojn oni rajtas konsideri kiel la daŭrigon de la 3 spacaj dimensioj, nome, kiel la 4an, 5an kaj 6an dimensiojn de la spaco.

La MOMENTO = NUL dimensio.




La linio determinita de 3 punktoj (antaŭe,nun,poste) estas la linio de la 4ª dimensio.

La 5ª dimensio estas la linio perpendikulara al tiu tempolinio (nome, al la linio de la 4ª dimensio)




Ĉi tiu perpendikulara linio pasas tra ĉiuj momentoj de l' Tempo: ĝi estas la linio de la senfina ekzistado de unu momento.

La linioj perpendikularaj al la tempolinio esprimas (ĉiu el ili esprimas) la ĉiaman (=senfinan) ekzistadon de la diversaj momentoj;ĉiu el ili estas la ĈIAMA NUNO de iu momento,k ĉiu momento havas tiun linion de ĉiama nuno. Jen la 5ª dimensio. La 5ª dimensio formas surfacon aŭ planon rilate la tempolinion.

Ĉiu momento enhavas difinitan nombron de eblecoj.Sed mi povas aktualigi aŭ nunigi nur unu el la ekzistantaj eblecoj. La nunigo aŭ aktualigo de ĉi tiu ebleco determinas la sekvan momenton,la sekvan NUNon,kaj tiel plu. Sekve, la linion de la Tempodirekto oni rajtas difini kiel la LINIOn de NUNigo DE UNU EBLECO.

La ĉiama ekzistado de tiu nunigo, la linio perpendikulara al la tempolinio estas la linio de la 5ª dimensio, aŭ la linio de l' eterneco.

Sekve:

LA ETERNECO ESTAS LA SENFINA EKZISTADO DE ĈIU MOMENTO DE L' TEMPO!

La eterneco estas la kurbiĝo de l' Tempo. La eterneco ne estas senfina etendado de Tempo; ĝi estas alia dimensio de la Tempo.

La koncepto de ETERNECO rilate la koncepton de TEMPO egalas al la koncepto de SURFACO kun tiu de LINIO.(*)

(*) Legindas p.23/30, rilate ĉi tiun temon, en: "ANKAŬ PRI ESPERANTAĴOJ!", en la SERIO: "POST UNU JARCENTO DE ESPERANTO" (EdeB) Mi citas nur ĉi paragrafon (pripensu ĝin!): "Eterneco kaj tempo estas nemezureblaj; ĉi tio signifas ke neniu kvanto da tempo povas fari la eternecon, same kiel neniu kvanto da longeco povas fari la larĝecon! Ili apartenas al malsamaj dimensioj!!!" (Kaj daŭrigu la legadon en: "ANKAŬ PRI ESPERANTAĴOJ!")

La 6ª dimensio estas la linio de nunigo de aliaj eblecoj enhavataj en antaŭa momento, sed ne nunigita en la Tempo (4ª dimensio).

La eblecoj nunigitaj estas en la 5ª dimensio;la eblecoj ne nunigitaj estas nunigitaj en la 6ª dimensio,kiu estas kunigo aŭ arigo de "ĉiuj tempoj".

La linioj de la 5ª dimensio formas "surfacon". La linioj de la 6ª dimensio, kiuj venas de ĉiuj punktoj de l'"Tempo",en ĉiujn eblajn direktojn,formas la "volumenon" aŭ la kontinuan tuton de tridimensia tempo, de kiu ni konas nur unu dimension.

7ª dimensio: Linio de neeblecoj aŭ aĵoj neekzistantaj. 7ª dimensio (neebla), 8ª kaj aliaj estas imagataj, ne ekzistas! La tuto de nia vivo konsistas el fenomenoj el la 7ª dimensio, nome,el fenomenoj de fikcia ebleco, de fikcia graveco kaj de fikcia valoro. Ni ne rimarkas ke:Multaj ne-ekzistantaj aĵoj aŭ aferoj ludas rolon en nia vivo, regas nian destinon kaj niajn agojn.

MALSAMAJ GRADOJ DE NEEBLECO

Mi ne povas preni de sur la tablo ion kio ne troviĝas tie, ekzemple, oranĝon aŭ la Ĥeopsan piramidon. Oranĝo povus esti tie; sed piramido ne povus esti tie!

Por la homo ĉiuj eblecoj realiĝas en la Suno; ĉi tio respondas al tio antaŭe dirita.La homo Nº 7 fariĝas senmorta,nome,postmorte pluvivas en la limoj de l'suna sistemo.

Resume kompilis: ERGOTO DE BONAERO



Post estonoj kaj litovoj venis tempo por latvoj. Ĉar dume neniu latva esperantisto sendis sian kontribuon al **"Laŭte!"** mi proponas pecojn el **"Epifanioj"** de mia ŝatata latva verkisto. Mi daŭre sopiras vidi liajn belegajn **"Kolorajn fabelojn"** en Esperanto. Jen do kelkaj pecoj por mediti.

## IMANTS ZIEDONIS

*Homoj, kiam ili deziras manĝi, montras sian internon, sian stomakon, kaj tio estas terure abomena. Kiam ili deziras manĝi - kun sia kolerego ili krias al siaj infanoj kaj proksimuloj! Pli bone vi ne alparolu oficiston kiam proksimiĝas lia tagmanĝa paŭzo. Li metos sian ventron surtablen apud paperujo, li krios al vi - "vi, vi, ĉu vi ne vidas?"*

*Pli bone vi ne alparolu vian kunulon, se li malfruis al tagmanĝo. Ne alproksimiĝu al li. Ĵetu, ne alproksimiĝante al la tablo, tranĉilon, forkon kaj kuleron, teleretojn kaj buŝtukon, ĵetu - kaj li glutos ilin. Kantu eternan himnon al digestado, kantu ĝis li trankviliĝos - ĝis li satiĝos. Ho, tiam li ridetos, tiam li iĝos kiel ĉiuj.*

*Kiam vi staras en vicego por aĉeti ion - ne perdu vin, atentu! Jes, starante en vicoj, homoj perdas sin. Kun kia naŭza stomakeco ili palpadas unuajn printempajn tomatojn aŭ viandon sur breto. Dio mia, kiel ili ŝanĝiĝas, se en kesto restas lastaj kvin kilogramoj da bananoj. Dek stomakoj komencas maltrankvili, dek stomakoj komencas envii kaj malami. Streĉas sin dudek kubutoj. Ekzistas plu nek filozofoj, nek prokuroroj, nek poetoj...*

*Ne permesu al via stomako pensi anstataŭ vi! Ne permesu al ĝi pensi, ĉar tio ne estas ĝia afero. Ne permesu, ĉar ĝi alvenos, diablo nur scias kien ĝi alvenos - malproksimen, malantaŭen, ĝis kojnodentoj.*

*Stomako ja scias ke ĝuste ĝi estis la unua filozofo en ĉi tiu mondo. Kontraŭ ĝi batalis, penante venki ĝin, menso kaj koro. Sed ĝi, stomako, aperas en la mondo ĉiam sub nova standardo, kaj nova armeo denove kreas novajn sanktregulojn.*

*Restu kun mi, mia klara menso, ne forlasu min, mia bona koro, kiam mi denove devos staradi en vico por aĉeti ion.*

*

*Subite kaptis min timo, ke mi povas tute forgesi fratinon mian. Ke ni iĝos kvazaŭ tute ne konataj.*
*En mia vivo mi multege parolis kun aliaj homoj, sed ĉu mi havis tempon paroli kun la propra fratino? Ni renkontis nin, salutis. Salutis kaj ĝisrevidis.*
*Ial ĝuste hodiaŭ mi ekvidis tiom klare etajn sulkojn ĉe ŝiaj okuloj, laborkonsumitajn manojn, kaj okulojn ŝiajn, tiom similajn al la miaj.*
*Se diri la veron - mi ŝajne neniam karesis permane ŝian kapon. Eble tiam kiam ŝi estis tute eta. Pli ofte mi ŝin batis. Ŝi ĉiam volis esti kun mi, sed mi ne volis. En mian kapon tiam eĉ ne venis penso ke ŝi postkuras min nur tial, ĉar mi estas ŝia plej proksima homo, kaj aliajn amikojn ŝi ankoraŭ ne havas.*
*Poste aperis amikoj.*

*Mi rememoras ŝin dum tiuj raraj tagoj kiam oni festis iun okazintaĵon en ŝia vivo. Parencoj manĝis kaj drinkis, babilis pri mono, laboro. Kaj neniu rimarkis kiajn lacajn, laborkonsumitajn manojn ŝi havas. Ke ŝi havas belan hararon, bluajn kaj purajn okulojn, kaj ke tiuj okuloj postulas amon. Neniu demandis - kion vi bezonas, kiel helpi vin. Oni diradis - aĥ, kia knabineto, suka bero.*
*Ŝajne ankaŭ tiam mi ne aliris vin, ne ĉirkaŭbrakis vin, ne diris al vi bonan vorton, sed nur banalajn gratulojn, kvazaŭ fremdulo al fremdulo. Mi ja estis la plej juna el tiuj, kiuj estis pli aĝaj ol vi, kaj mi devis kompreni, mi ja estis via frato.*
*Poste estis edziĝfesto. Ŝia, de fratino mia. Kaj ŝi ne havis tempon por parencoj - aperis Li.*
*Kaj poste - vi havis infanojn, kaj mi havis infanojn, vi havis vian laboron kaj mi - la mian, vi havis viajn zorgojn kaj mi - la miajn, kaj ni ne havis tempon.*
*Kaj jen hodiaŭ subite kaptis min ĉi tiu stranga timo - kvazaŭ en sonĝo mi ekvidus vin malgranda, kvazaŭ ekparolus en mi la voĉo de l' sango. Tiom mi amikiĝis kun fremdaj homoj, sed al la propra fratino kapon ne karesis mi, unu el la plej proksimaj, kies okuloj tiom similas.*
*Subite kaptis min ĉi tiu timo. Kvazaŭ aŭdiĝus sangovoĉo. Voĉo, sonanta ie tie, en profundo, en mallumo.*



*

*El kiu etaĝo ni alparolas unu la alian, en kiu etaĝo ni parolas?*
*Mi dividus niajn interparolojn laŭ etaĝoj.*

*Jen etaĝo kie blinda parolas kun blinda, surda kun surda, manĝanto kun manĝanto, dormanto kun dormanto. Pri vetero kaj malsanoj, pri tio ke aĥ! kiom saĝas nia infano kaj pri tio ke aĥ! tiu najbarino Julia malbone agis.*
*Kial aliaj interparolantoj neniel povas fini konversacion, komencas ĝin - kaj eksilentas? Rompiĝas fadeno. Pri kio paroli se ĉiu el ili parolas el sia etaĝo? Unu parolas ekzemple el la unua, dua - el la dua. Kion eblas diri tra planko? Kion eblas aŭdi tra plafono?*
*Jen etaĝo kie konversacias sprito kaj fleksebla lango. Ĉi tie oni ludas tenison per pilko-vortoj. Bato postulas kontraŭbaton. Ĉi tie oni tre lerte ĵetas kaj rebatas, kaptas kaj baras. Ĉi tie loĝas lertaj ekvilibristoj kaj vortĵonglistoj. Ĉi tie oni kaŝas sin malantaŭ vortoj kiel herooj de Goldoni kaŝas sin malantaŭ florpotoj. Ĉi tie oni ludas kaŝludon. Vortoj flirtas, vokaloj koketas, konsonantoj distras damojn. Ĉi tie oni rakontas anekdotojn. En mistera lumo briletas trompa mozaiko, farita el diverskoloraj vortoj. Ĉi tiu zingibra bakaĵo - ĉu oni ĝin manĝas aŭ ornamas abion per ĝi? Dolĉas tiu konversacio - kardamono, cinamo, vanilo.*
*En tiu ĉi etaĝo oni parolas pane. Jes, ĉi tiea parolo estas pano, propramane bakita. Vorto, kiun vi mem knedis kaj atendis ĝian fermentadon. Vi mem metis ĝin sur bakilon, mem metis ĝin en fornon. Jes, la krusto iom brulis, ĉi foje iom brulis, sed en knedujo ankoraŭ multas pasto, kaj ĝi ankoraŭ fermentas, kaj sekvan fojon tio ne okazos.*
*Ĉi tie oni parolas ankaŭ ŝtone. Per ŝtonoj, kiuj povas fenestron frakasi, kaj per ŝtonoj, kiujn oni metas en fundamenton.*
*Ĉi tiea lingvo estas rezintolo. Por ke pluvo ne malsekigu. Kaj ĉi tie oni parolas punte, sed ankaŭ trikilojn uzas.*

... Tio kompreneble ne estas ĉiuj etaĝoj, kaj sekvo ilia, verŝajne, tute ne estas tia. Sed vi sciu, lango mia, ke vorto estas pano ĉiutaga kaj energiportanto, portanto de energio, kiu iras de mi al vi.

Kiam miaj fortoj ekmankos, ĉu venos al mi vortoj viaj kaj helpos min?

Ĉu relevos min el mortintoj vortoj viaj?

*

Ni ĉiuj estas flakonetoj-boteletoj, retortoj kaj afiŝfostoj - surgluis nin etikedoj kaj aliaj paperoj, kiel diktas tion kutimo.

Ho, etikedo, la rekona signo de homo!

Vi havas larĝan gabardinan mantelon - do, vi estas "la nia". Vi havas tatuaĵon surbruste kaj surbrake - por iuj vi estas "la nia". Viaj haroj hirtas kaj gitaron vi havas enmane. Vi estas ĝentlemano, sed vi kanajlo. "La nia, nia, nia"...

Iujn oni rekonas laŭ eksterlandaj vestoj, laŭ malhelaj okulvitroj, laŭ kaskedoj aŭ ŝelkoj. Iuj havas kostajn felĉapojn, kiuj nenie aĉeteblas.

Sed venas tempo kiam vi deŝiras de vi ĉion kaj iĝas pura kiel dekomence.

Mi longe suferis. Mi iam akceptis mian etikedon. Mi estis pacienca, mi sidis ĉe tablo apud vi kaj timis moviĝi. Mi timis ĉu eble ŝajnos al iu ke mia kravato estas ligita tro neglekte. Mi timis ke mia kubuto trafos hazarde en vian salaton. Mi timis ke eble mi butonumis min ne tiel kiel decas (nun mi fajfas pri tio!)

Fleksu la maldekstran kruron, knabo mia, kaj kliniĝu. Invitante al danco, ne trairu la tutan salonon. Al damo necesas manon kisi. Ne interrompu parolanton, aŭskultu kun estimo.

Mi aŭskultis. Kunpreminte la dentojn. Preskaŭ plore. En senespero - ĝis sepa ŝvito. Mi timis ekstari kaj iri for. Mi timis frapi vin sur ŝultrojn, difekti artikojn (ci, kompano, fremdajn vortojn uzas - ĉu ci ne ŝtelis ilin?), timis fali meze de salono kiel en epilepsiatako kaj konvulsii pro senespero dum vi parolis. Mi timis diri ke amelaĵo trafis en vian blovtubon - ĉu vi mem ne rimarkas tion, ludante? Mi timis, timis, timis, sed nun mi diras - iru vi al diablo!

Mi estis bela brila botelo, sur kiun oni gluis etikedojn, kaj suno ne rebrilis en mia vitro.

Malrapide mi deŝiras la etikedojn. Ankoraŭ mi sentas gluon restintan surhaŭte, sed baldaŭ mi liberiĝos ankaŭ de ĝi.

Mia umbiliko estas sur mia umbiliko, kial mi permesu glui etikedon sur ĝin?

Infano naskiĝas nuda. Oni vestas ĝin per blua ĉapeleto, se ĝi estas knabo, kaj per rozkolora, se knabino. Kvankam eĉ sen tio ĉiuj vidas ke la knabo havas ĉion kion knabo devas havi, kaj la knabino same...

Ni ĉiuj estas boteloj, vazetoj, afiŝfostoj. Ĉiuj glumarkitaj kaj glumarkotaj. Tio estas la kutimo. Tio estas neceso.

Kaj tamen mi parolas pri dialektike neevitebla neceso - la neceso deŝiri.

Esperantigis **Oksana**

****************************************************


**OKA RODANA ESPERANTO-RENDEVUO**

en AVIGNON 12-13/10/91

kun Perla MARTINELLI, Ĝiorĝio SILFER, NIKOLIN'

**DEK-TRIA ZAMENHOF-TAGO** en AVIGNON

15/12/91.

Michel DUC GONINAZ prelegos.

Sin informi al : GENTE, 9 av. des Erables, 84000 AVIGNON

****************************************************

**Alvoko de JORGOS al muzik- kaj dancemuloj**

Se vi ŝatas ek- aŭ plu-lerni, kiel ludi "laŭtonan akordionon" aŭ kiel danci tradiciajn dancojn (rondodancon, mazurkon, polkon, "bureon", skotiŝon ktp.), ne timu informiĝi kaj anonci vian pretecon partopreni staĝon (dum kiom da tagoj kaj je kiu periodo?) al :Ĵerar' kaj Monik' GARIG' - Muelejo - F-09600 LIMBRASSAC. Ĝis baldaŭ!

*Marcello* ***Pistolesi***

**KARA ARBO,**

*en mia ĝardeno estis nur ci : alta, grandioza, frondabunda, riĉa de malgrandaj ruĝaj sunoj, kiel okuloj flamaj, kiuj alrigardis min inter la arbetaĵoj.*

*Ciaj grandaj branĉoj, la folioj, kiuj fariĝis verdaj kaj la ŝelo, kiel mola haŭto, stimulis min esti tie, por longe rigardi cin.*

*Ju pli mi rigardis cin kaj des pli ŝajnis al mi, ke miaj brakoj kaj miaj fingroj fariĝas branĉoj kaj folioj : jes, ankaŭ mi estiĝis granda arbo kiel ci.*

*Nun, kiam ci ne plu estas en la spaco kie mi loĝas, nostalgie mi pripensas la plentagojn de suno, kiam, sen ke neniam la tempo finiĝus, mi grimpis glitinte inter ciajn fortajn branĉojn aŭ mi pendis de ili balanciĝante senĉese.*

*La ombro de cia hararo protektis min malvarmetiginte eĉ la aeron per cia rezina bonodoro.*

*Ho, kiel bele atingi cin tuj kiam la plenaĝuloj por la siesto ekdormis posttagmeze! Kaj ci donis al mi cian spacon, interŝanĝinte cian "ripozon" kontraŭ mia "ludo".*

*Mi observis ankaŭ ciajn ŝanĝadojn. Ili ne ŝajnis veraj al mi, tiel malrapidaj ili estis : ci flaviĝis kaj poste ci perdis ciajn foliojn, restis nuda; sed ĉiam pli granda unu tagon de printempo ci staris denove en formo brilega. Nubo blanka de mallarĝaj floroj ĉirkaŭis cin, la aero ĉirkaŭe pleniĝis de bonodoro kaj dolĉaj sonoj de abeloj vivigis cian silenton.*

*Poste, iom post iom, ciaj fruktoj kreskis, de verdaj al klaraj, de rozkoloraj al ruĝaj.*

*Tiuj estis tagoj de nova gusto : ĉiuj ni povis rikolti ciajn ĉerizojn, glatajn, ŝveliĝintajn de suko, dolĉajn kaj acidetajn, belajn ĉar malsimilajn al ĉiaj aliaj fruktoj!*

*Dum multaj jaroj nia amikeco firmiĝis ; ĉiam estis nova sezono.*

*Nun ne, ni ne povas plu, mi loĝas aliloke, sed la memoraĵo kreskis kaj nuntempe ci estas, en mia imago, ĉiam alta, grandioza, frondabunda, riĉa de novaj kaj neelĉerpeblaj fruktoj.*



## SUR VOJO AL LA AŬSKULTO DE ESPERANTO

fare de
**Sergej Stepanow**

En multaj esperantistoj iam kaj tiam okazas deziro ekaŭdi iun kiu parolas esperante. Ludoviko Zamenhof kontentigis tian sian deziron kiam li renkontis la poeton Antonij Grabovskij.

Tiam, en tiu fora tempo, ili ambaŭ ekparolis en la internacia lingvo kaj ekaŭdis kiel plaĉe nia lingvo sonas.

Tamen, koncerne min, mia persona vivo formiĝis tiamaniere ke mi ne tre ofte profitis el similaj kontaktoj.

Kiel regulo, mi simple ne povis trafi partneron kun kiu mi povus interparoli esperante. En aliaj vortoj, mi apartenas al tiu grupo da esperantistoj kiuj uzas la internacian lingvon Esperanto en konversacioj kun unu sola persono en la mondo: kun si mem.

Nature, tion ili faras nur en sia menso.

Sed, feliĉe, iam mi trovis kiamaniere mi povus plibonigi tiun mian situacion. Por tio sufiĉus komenci aŭskulti esperantajn radio-elsendojn.

Por fari tion, mi simple devos aĉeti ricevatoron de la radio kies diapazono inkludas ankaŭ kurtajn ondojn. Ĉar per tiaj ondoj tiam okazis la radio-elsendoj.

Sed mi ne povis trovi la kurt-ondan ricevilon en aŭstraliaj magazenoj.

Tamen, foje, trafoliumante ian radio-revuon, mi renkontis reklamon kiu rekomendis akiri la aĉeteblan kurt-ondan radio-ricevilon kiu nomiĝis "Trio".

La anonco pri la ricevilo certigis ke se iu radio-stacio aperos unufoje sur ia bendo, la sama stacio ĉiam reaperos sur la sama loko de staciplako. Tio enorme ĝojigis min.

Mi rezonis: "Se mi sukcesos unufoje ekaŭdi iun radiostacion en Aŭstralio per ĉi tiu ricevilo, mi povos laŭ deziro ĉiutage, senescepte, kapti la saman stacion." Sed kiel mi eksciis pli poste, ĉi tie mi eraris.

Por aĉeti tian ricevilon mi iris al la magazeno kiu vendas tiajn aparatojn. Sed bedaŭrinde, la ricevilo kostis tre ege multe.

Vidante mian konfuzon pri la prezo, la komizo de la vendejo ekprovis kvietigi min. "Vi povos, li klarigis, havi la ricevilon pagante nur 20 procentojn de ĝia prezo. La restantan ŝuldon vi amortizu pagante ĝin poparte per egalaj sumoj."

Post eta paŭzo li aldonis : "Tio signifas ke vi finpagos la ricevilon en la daŭro de 24 monatoj. Do, se vi nun pagos la antaŭpagon, vi povos havi la ricevilon tuj post kiam vi subskribos kontrakton."

Sed antaŭ ol subskribi la kontrakton, ĉi tie mi iom pripensis.

"Se mi aĉetos la ricevilon pagante ĝin poparte, mi devos aldoni al ĝia kosto, por la pago de interezo, ankoraŭ duonon de la prezo."

"Ne, mi pensis, mi ne povas permesi al mi tian elspezon el mia budĝeto. Krome, post tia granda elspezo, mia edzino certe diros ke mi freneziĝis."

Kun tiaj pensoj mi dankis la komizon pro lia demonstro kaj diris ke mi volas ekrigardi ankoraŭ en alia loko.

Foje poste, ia firmao en Melburno, Aŭstralio, en la urbo kie mi loĝas, komencis vendi kurt-ondajn radio-ricevilojn fabrikitajn en Soveta Unio. Ili ne kostis multe: 89 dolarojn por ĉiu.

Tiuj riceviloj havis ankaŭ tiel nomatan bend-etendigon.

Necesas klarigi, ke, ordinare, ĉe la kurt-ondaj radiostacioj sentiĝas ia sento de grego. Ili amasiĝas unu al alia kiel svarmo de abeloj.

Kaj se kurt-onda ricevilo ne havas specialan aranĝon por disapartigi la staciojn, la agordo de la dezirata stacio fariĝas tro peniga.

Sed la bendetendigo disapartigas la kurt-ondajn staciojn unu de alia. Kaj tia disapartigo de la stacioj pere de la bendetendigo pruvis al mi la avantaĝon de la soveta radio-ricevilo.

Tial, konvinkite pri utileco de la radio-ricevilo, mi aĉetis ĝin.

Bedaŭrinde, kiam mi elprovis la ricevilon hejme, ĝi ne montriĝis tiel perfekta kiel mi supozis.

Vere, mi povis kapti kelkajn kurt-ondajn radio-staciojn, sed kun multe da bruo. La senco de diritaj, fare de ili,



frazoj restis tute ne komprenebla.

Inter la ricevitaj stacioj troviĝis tiaj, kiel La Voĉo de Ameriko en la angla kaj rusa lingvoj, kaj ankoraŭ kelkaj aliaj. Ne tre multaj.

Kaj certe ekzistis nenia ŝanco plenumi mian deziron ekaŭdi Esperanton.

La embarasajn bruojn kaŭzis aŭtomobiloj kiuj amasiĝis sur du vojkruciĝoj en mia strato inter kiuj mi loĝis, en ĉirkaŭurbo de Melburno. La bruoj certe eliĝis disde tiuj aŭtomobiloj kies sparkiloj eksplodigas ties gasmiksaĵojn.

Do, tiuj tedaj bruoj ne permesis al mi atingi mian celon de la esperanta aŭskulto kun la helpo de tiu ricevilo.

"Kion fari?" mi pensis. Kaj kiel respondo al ĉi tiu demando venis interesa ideo. Sed unue utilos iom rakonti kiamaniere tiu ideo povis ekaperi.

Multe da jaroj antaŭe, kiam mi vivis en Krasnodaro, urbo en la Norda Kaŭkazo, mi interŝanĝis vortojn kun unu el miaj konataj esperantistinoj. Ŝi diris, ke ŝi konstruis radio-ricevilon kaj ke ŝi aŭskultas radio-elsendojn de loka Krasnodara radio-stacio.

"Ĉu vere?" mi demandis.

"Jes, vere", ŝi respondis. "Bonvolu veni al mia hejmo kaj ekrigardu la ricevilon. Tiam vi konvinkiĝos."

"Dankon, mi diris. Sed kiam? Nun, aŭ..."

"Venu tuj. Tiam vi ne nur ekvidos mian ricevilon, sed vi povos aŭskulti elsendon de Krasnodara radio-stacio. Interalie, nia radio-stacio duonhore ĉiusemajne transdonas, en la rusa lingvo, paroladon pri disvastigo de Esperanto kaj ĝiaj atingoj."

Kompreneble, mi volonte akceptis ŝian inviton.

Ŝia aparato konsistis el eta kesto kun granda butono sur ĝia surfaco. Tie vidiĝis ankaŭ ia vitra tubeto. Du dratoj eniris en la keston el sub la fenestro.

Post kiam la fraŭlino invitis min sidiĝi, ŝi metis la aŭskultilon sur mian kapon. Ĉi tie unuafoje en mia vivo, mi ekaŭdis la radio-elsendon.

Tiu unua aŭskulto de la radio ekŝajnis al mi kvazaŭ miraklo kaj enorme ĝojiĝis min.

Poste, la fraŭlino eligis la tutan ricevilon el la kesto kaj montris al mi la detalojn.


"Tio estas la bobeno de memindukto, ŝi diris. Tio la variigebla kondensatoro. Kaj tie, sur la kovrilo, en la glaso, troviĝas la detektilo."

Sed en tiu tempo la konstruo de ŝia ricevilo ekaperis al mi ia nesolvebla enigmo. Tiom nekomprenebla ekŝajnis al mi ŝia speciala ĵargono.

Kaj, spite la fakton, ke mi ne komprenis la signifon de ŝiaj vortoj, mi jam tiam ekdeziris havi tiaspecan ricevilon.

Speciale, mi volis ĝin havi por povi aŭdi la programojn pri la ideo kaj disvastiĝo de Esperanto. Cetere, kiel mi jam diris, la konstruado de la ricevilo ekaperis al mi tiom komplika, ke mi eĉ ne povis revi pri ĝia memstara konstruo.

Tamen, ĉio ŝanĝiĝis post kiam mi iafoje iris al la Krasnodara Esperantista Societo. (daŭrigota)



Bildo el Aĝenio :
Nérac (Nerak) : Ruinoj el la kastelo de Henriko la 4a



# LA VIOLONO KAJ MI

Mi malŝatas la violonon. Kial do mia patro trudis al mi, kiam mi estis dekunujara lerni tiun aĉan muzikilon? Ĉu, ĉar li, senlaborulo pro la milito, volis pasigi la tempon ankaŭ lernante tiun kvarŝnuran hororaĵon? Ĉu li eble intencis fari el mi novan virtuozon, kies famo estus povonta briligi la familinomon? Kiu kapablas scii?

Tamen, la afero agrable komenciĝis. En la montrofenestro de la violonfaristo la diversaj poluritaj instrumentoj ŝajnis alvoki min. Tiutempe, aĉeti ion estis ankoraŭ grava okazaĵo, en kiu la tuta familio nepre devis partopreni. La butikestro, duona Dio inter la violonoj, kontrabasoj, gitaroj, afable akceptis nin en sia muziktemplo kaj vendis al ni, ne unu, sed du violonojn! Nur tiam mi komprenis, ke ankaŭ mia patro volis eklerni la violonon.

Trame reveturante hejmen, mi fieris kiel pavo pro la violonujo. Mi kredis jam aŭdi la aplaŭdojn de la pasaĝeroj.

Hejme, mi tuj volis ekprovi mian talenton.

- Jes, jes, diris mia frato, tiu stulta heloto, ŝtopante siajn orelojn, pli bone vi ekzercu en via ĉambro.

- Petro, ne taŭzetu vian fraton, admonis panjo, kaj vi, Heĉjo, ne malŝparu vian talenton por tiu stultulo kaj iru dorloti vian novan ludilon en vian ĉambron.

*

- Saluton, mi estas Henriko, via nova lernanto. Mia patro telefonis al vi por rendevui.

- Jes ja, mia knabo, mi atendis vin. Eniru!

Meze de la muziksalono, en terura malordego, staris granda malfermita tripieda piano. La instruisto, Sinjoro Verli, aspektis kvazaŭ nano apud tiu monstro. Ĉie troviĝis artaĵoj rilatantaj al muziko : gipsaj statuoj de Beethoven, Mozart, antikvaj muzikiloj, montoj da partituroj, kaj, en angulo, bela pentraĵo pri la tiea majstro, sin apoganta sur piano. Ĉu la pentristo grandigis la artiston, ĉu li malgrandigis la pianon, fakte estis ke la rilato piano-artisto estis multe pli favora al tiu ĉi lasta ol ĝi reale estis. Ankaŭ pentristoj devas perlabori porvivaĵojn.

- Mia knabo, diris Sinjoro Verli, unue montru al mi viajn manojn, por ke mi povu juĝi ĉu viaj fingroj estas sufiĉe longaj por lerni la violonon.
- Hm, hm, ili povus esti pli longaj, tamen, per diligenta kaj konstanta laboro ni atingos rezulton. Ĝis nun neniam fiaskis mia arta apostolado, eĉ pri lernantoj kun malpli longaj fingroj ol la viaj.

Ĝis nun, miaj fingroj sufiĉe bone sukcesis kontentigi min, sed subite ili naŭzis min, ŝajnante al mi barilo sur la vojo al brila artista estonto.
- Kaj nun, mia knabo, ni tuj komencos la studadon de la solfeĝo. "La solfeĝo ne estas ĉio, sed sen solfeĝo oni estas nenio". Eĉ Bach devis lerni la solfeĝon antaŭ ol komponi la brandenburgajn koncertojn.

Mi, dum kelkaj semajnoj, eĉ ne devis kunporti mian violonon. Sinjoro Verli enkondukis min en la sekretan labirinton de la diesoj, bemoloj, okonotoj, kvaronsilentoj, kleoj ktp. kaj hejme mia patro kontrolis, ĉu mi fervore lernas tiujn ĉikanaĵojn, sub la mokantaj rigardoj de mia frato.

Kelkajn semajnojn poste, finfine mi rajtis ricevi mian unuan violonlecionon. Dum la tramveturado al la majstro, mi kaj mia violonujo indulge konsentis sidi inter la neinicitaj pasaĝeroj.

Ni estas tiam en februaro 1944, la germanaj okupantoj nervoziĝas kaj, serĉante partizanojn, oftege kontroladas la legitimaĵojn de la loĝantoj.

Kompreneble, ĝuste tiun tagon, nia tramo ne eskapas al kontrolo. Ĉiuj devas eltramiĝi. "Legitimaĵojn! Malfermu la valizojn kaj la sakojn". La violonujo, en la okuloj de la kontrolistoj, estis ege suspektinda aĵo, taŭga por transporti pafilon. Ankaŭ mi devas malfermi mian ujon antaŭ la malfidaj soldatoj. La vido de la violono tuj senkatenigas ondon de ridego ĉe la ĉeestantoj. Ĉu ili ridis pri mi, ĉu pri la soldatoj, mi ankoraŭ nun ne scias. Plurfoje okazis tiaj kontroloj kaj, iom post iom, mi ekmalamegis mian violonon, kiu, miaokule, ridindigis min.

Kelkajn monatojn poste, mia karmemora patro mortis. La tiamaj funebraj kutimoj malpermesis aŭskulti kaj ludi muzikon dum pluraj semajnoj. Pro tiu malpermeso mi ja



ne ĉagrenis. Mi kaŝis la muzikilon. Neniu el la familianoj ŝajnis deziranta retrovi ĝin.

Tiel plenumiĝis la eksedziĝo inter mi kaj la violono. Milito havas neatenditajn konsekvencojn.

Henri CASTIAU


**SAT-BROŜURSERVO ĵus reeldonis :**

F. FAULHABER : **NE TIEL, SED TIEL ĈI !**
Konsilaro pri stilo.

"Preskaŭ ĉiuj spertis, ke iuj libroj kaj artikoloj legiĝas facile, aliaj malpli facile.
Ni ĉiuj deziras havi facilan kaj elegantan stilon, tial F. Faulhaber volis helpi al ni per siaj konsiloj en ĉi tiu libro.
Ano de la Akademio, ano de la Literatura Komitato de SAT kaj recenzanto por pluraj E-gazetoj, Faulhaber devis kritike legi multajn E-verkojn. Li notis abundon da kritikindaj frazoj kaj esprimoj. Li prezentas ilin en ĉi tiu libro aldonante ilian preferindan formon.
Kun granda ĝuo vi legos, komprenos, admiros kaj imitos. Tiel ankaŭ vi iom post iom fariĝos bona stilisto..."

Kun la permeso de F.L.E. (Nederlanda L.E.A.-o) ni ĵus reeldonis tiun ĉi interesan "Konsilaron pri stilo". 64 paĝoj. Mendkodo NT. Prezo : 15 FF + afranko.

**EL VERKOJ DE E. LANTI.** Unua volumo.
kun jena novarangita enhavo : **For la Neŭtralismon! - La Laborista Esperantismo - Absolutismo - Herezulo - Herezaĵo - Adamaĵoj.** 172 paĝoj. Prezo : 35 FF.

**MALLONGE**
**pri somero 1991**
**en "Cargue Sac"**

# LETERO EL NIA MUELEJO

* La unua restado (de la 8a ĝis la 14a de julio) estis nuligita pro manko de interesatoj.

* Ekde la 29a de julio vizitis la muelejon (kie jam antaŭe alvenis la nederlanda familio de Henk kaj Marijke) : familio Redoulez (Camarsac), Katrin' kaj François (Compiègne), Jacques (Périgueux), Jacqueline (Strasburgo), Jorgos (el Arieĝio), Feliciano (Gardanne), familio Gabalda (Massy), Vilhelmo (Durban-Corbières)...

Dume, progresis la laboroj : Albert elturniĝeme preparis la unuan dormejon, kun bone kaj originale izolita plafono. Post instalado de metala ĉeftrabo anstataŭanta la lignan, kiuputris, Henk farbis la tutan plafonon de la mueleja teretaĝo. Dank'al baraĵo de Gastono, la rivereto provizis nin iom pli longe per banakvo. Lulu preskaŭ finkonstruis luksan hotelon por siaj anasoj, anseroj, kokinoj... Kelkaj ŝvitemuloj reeldonis Lanti kaj Faulhaber (vd. la antaŭan paĝon!). François jam de la unua provo regalis nin per siaj kukoj. Feliciano alportis al ni gajon kaj humuron spicitan per sukoplena marsejla akcento. Jorgos iom rakontis pri siaj perbiciklaj aventuroj. Ni bonvenigis Jacques, la saĝulon, kaj Jacqueline, la rideksplodeman... Henk kaj Marijke rakontis pri siaj antaŭaj eventoplenaj ferioj en Francio... Pro la ĉi-jara bedaŭrinde nesamtempa vizito de du familioj kun denaske esperantoparolantaj infanoj, ekĝermis la ideo sugesti renkontiĝon de tiaj E-familioj en la estonteco. Kia plezuro estos aŭdi la babiladojn de Sabrina, Ideal, Belonia, Mevina..., facile ĵonglantaj per esperanto kiel komuna lingvo, krom la ŝajne akcesoraj franca, germana, ĉeĥa, hispana kaj ceteraj!!!

********************************************************

**la venonta numero aperos fine de novembro**

********************************************************

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47470 Beauville. CPPAP 58651